Julianna Vas–Szegedi,

# Post vintro

Vekiĝas la natur', printempon atendas.
Branĉetoj verdiĝas malvigle kaj treme,
sed ilin jam tuŝis la ĉiel' senteme,
odoranta venteto supren etendas.

Kreskas floretoj, ŝajnas kolora kovril'
sub blua ĉiel'. Birdoj kantas senĉese,
gejunuloj interbrakumas karese,
promenadas duope en dolĉa trankvil'.

Vekiĝas arboj kaj bestoj, eĉ la Tero,
varmiga lumo, kiel majesta tuko
sin sternas, kaj ĝermas la nova espero.

La morto kaj la nasko daŭre alternas,
la homoj foj-foje falas kaj ekstaras,
sed la benita Vivo ĉiam eternas!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Julianna Vas–Szegedi, publikigita 2005-04.*

*Arg-306-619 (2005-05-04 09:50:42)*

*Origine verkita en Esperanto de s-ino Julianna Vaz-Szegedi, Tiszafüred, Hungario*